É 100% Regular

Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.

Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO, SET,2010

Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br

Donace por VK-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00.

.....

POŜTKARTO

Kvankam tre prokrastite (ne videblis dato) mi ricevis pasintan semajnon plian atestilon de longedaŭra amikeco far Lenio Marobin, el la E-Kongreso en Kubo, nia komuna amiko kaj favoranto de la gaŭĉaro, kiu delonge deĵoras en Londono. Li iom komentas erojn de la Kongreso kie, domaĝe li devis aŭdi plurajn krokodiladojn. Nia unua renkonto okazis sur PlacoKinze, POA, antaŭ ol ni kune iris ĉeesti VK-kunsidon. Tiam ŝajne li sentis sin kiel mi en unuaj tempoj, antaŭ ol renkonti esperantistaron, iom ĝenata de la antaŭjuĝo, ke oni eble tro fiaskos inter nekonataj gekolegoj. Kvankam memlernanto li estis, mi tuj rimarkis ke li veteranece elturniĝos. Tiel okazis kaj li kuraĝigite ekflugis en la vivo al pli altaj niveloj ol mi mem, ĉefe pro sia elstare bona prononco italida. La sama kiu ĉiujare alportas stakon da revuoj disdoneblaj inter geamikoj sen postuli rekompencon. Mi riskas opinii ke li meritas ricevi almenaŭ INTERNET-mesaĝon kun QSL=ricevita/dankon.

IOM el PORTO LUSENA.

En la jaroj kvardekaj, mi deĵoris dum kelka tempo en tiu vilaĝo – hodiaŭ bela urbeto – Porto Lusena, situas livamarĝene de la ĉarma rivero Urugvaj'. Tiutempe mi estis tria serĝento radio-telegrafisto en la stacio PYK9. La taĉmento tie garnizonis dum militaj jaroj de la granda Dua Mondmilito. Komandis ĝin unu oficiro kun la respektiva soldataro plu du radiotelegrafistoj, la serĝento Troeto kaj mi ankoraŭ komencanto en la profesio. La R-stacio aktivis nur unu fojon matene kaj unufojon vespere dum kurta tempo, por kontaktoj al la ĉefurboj Porto Alegre kaj SanktaRoza. Laboro malmultis.Tro ofte malhelpis QSS-"fading"=radionda propagado tute izolis nin, manke de kontaktoj ĉar ni rajtis uzi nur la 40m bendon.

La ĉirkaŭa loĝantaro konsistis 50 el cento da kolonistoj, preskaŭ ĉiuj estis germanidoj. En la militaj jaroj ĉiuj estis suspektaj spionoj. Ili respektegis nin militistojn. Serĝentoj por ili estis altrangaj personecoj. Oni estis invitataj al preskaŭ ĉiuj eventoj. Kun la familio de Troeto ofte ni devis partopreni balojn. Tiel okazis ke mi havis amatinon, la instruistinon Silvia. Ŝi lernigis min iomete danci. Ŝi diradis: por danci laŭ ritmo de samba, vi devas minace fari paŝon sed ne plenumi ĝin... vi faru ideon kiom ofte mi tramplis sur ŝiajn piedojn ! Bona persono ŝi estis. La amindumo ne prosperis ĉar mi estis nur malaltranga militisto kaj ne povis promesi al ŝi komfortan vivon.

En la urbeto ni kalkulis pri ĵus forlasinta la universitaton, junan kuraciston Dr. Izidro. Kun li plus la havena ĉefo Kasimiro Tesis, ni formis triopon por kune sin bani en la purega akvo del'Urugvaj', preskaŭ Ĉiujn posttagmezon. Oni malkovris ke transe de la rivero, do en la argentina bordo, estis kaduka, forlasita kampobieno kie belaj tanĝerinoj putriĝis pro manko de loĝantoj kaj uzantoj. Ni decidis transnaĝi la riveron, ĉ.800m larĝan, por

,frandi la bongustegajn fruktojn. Revene oni bedaŭris ke ne eblis naĝe kunporti grandan provizon da ili.
De tempo al tempo triopo el la taĉmento aventuris ĉasi fiŝojn, per fusilpafoj. Post plenĉarĝi autobaterion, provizi sin per lumelĵetilo kaj boateto oni dum belaj vesperoj remis ĝis konata rapidfluo en la rivero. Tie alvenintaj, unu homo en la pobo stiris la barketon laŭ la forta fluo. Kiu tenis la lumĵetilon balais la klaran akvon antaŭ si. Kiam fiŝo dourado estis videbla, la pafisto agis samtempe preta por salti en la akvon, kapti la duon mortan fiŝon antaŭ ol oni perdis ĝin el la vido. Estis belaj ekzempleroj ĉ. 5kg pezaj. Tiu fiŝkaptado kutimis daŭri ĝis noktomeze. Tiutempe pafoj neniel alarmis la loĝantojn ĉar ĉasi estis ne malpermesata. Neforgesebla periodo de mia vivo kiel serĝento.
Iam, zorgante la energifonton de la stacio(elektro-grupo el benzinmotoro plus generatoro), pro eta malzorgo mia, la ventuma sistema kaptis mian genuon pere de la pantalontubo. Okazis sufiĉe serioza vundiĝo. Bonŝance apude estis apoteko kies posedanto, sinjoro Koenen, bonkore flegis min. Estis nebezone veturi al hospitalo en SanktaRoza.
>>>Aldona Evento pri PortoLusena.
Dum la militaj jaroj, 1940/45, nia taĉmento garnizonis la marĝenon de Rivero Urugvaj de PortoMaŭa' ĝis PortoŜavier', rajde kaj per boatoj. Iam triopo da soldatoj enboatiĝis por plenumi mision. Maturino enŝovis sian fusilon en la pruon por ekveturi. Okazis pafo. La kuglo trafis lian dekstran genuon. Liaj kolegoj portis lin al la soldatejo. Oni zorgis pri aŭto per kiu li povis veturi al SanktaRoza. Malfacila tasko. En tiaj militjaroj trovi benzinon sufiĉan ege malfacilis. Pluraj aŭtoposedantoj kune arigis sufiĉan por atingi la celo, tio por la reveno gravis dualoke. Indikita por akompani la vunditon estis mi. Ni sukcesis ekveturi ĉirkaŭ 23ª horo. Senesperiga kaj tre laciga ĝi estis ĉar nia malsanulo ne longe eltenadis la veturon malrapidan, sur tera malebena vojo. Li kompatoveke ĝemadis. Ofte oni devis halti por ripozo kaj iomete ŝanĝi la pozicion de liaj gamboj. Fine ni estis venkintaj la 60Km kaj atingis la hospitalon en SanktaRoza.
Alia evento, ankaŭ urĝa veturo al SanktaRoza, okazis kelkajn monatojn poste.Soldato el nia taĉmento plendis pro fortaj brustaj doloroj. Niaurba kuracisto Dr.Izidro, manke de Iksradioj-aparato, suspektis pri pneumonio. La komandanto unua leŭtenanto Pedro Marselino opiniis necese konduki lin serĉe de adekvata subteno. Jen, denove mi estis indikita konduki la soldaton al hospitalo. Ĉifoje veturigis nin sinjoro Ŝnajder, la notaristo per sia moderna aŭto. Pretemo ne mankis sed benzinon oni malfacile arigis sufiĉan por la veturo. Ie tien oni kolektis "magrajn" kvantojn, eĉ iom el la provizejo de PYK9 devis helpi. Ni ekveturis ĉ.la 22h. La lumĵetiloj atingis animalojn flanke de la tervojo oni vidis nur duopajn fosforajn reflektojn, el iliaj okuloj. Subite aperis leporo sur la vojo. Ĝi kuris longan vojpecon antaŭ nia aŭto kaj atingis 60Km/h, ĝis ĝi trovis devojiĝon. La veturo finiĝis senproblemoj, preskaŭ komforte.

SILENTO KORODAS

La nula reago far la gelegantoj al miaj provokoj plurfoje lanĉitaj pere de ĉi bulteno korodas miajn internaĵojn. Silento igas min dubi ĉu pokaj el nia rondo plene komprenas la tekstojn proponitajn en Gisto aŭ ĉu la silento reprezentu plenan malaprecon je miaj proponoj. Mi ne sukcesas digesti la ideon, ke ĉiuj pentas esti lernintaj nian flekseblan kaj belan lingvon. Krom Zaghetto kaj pokaj aliaj iam reagis favore aŭ kontraŭe al miaj temoj. Pli plaĉus min io tia : iru dormi, oldaĉo, se vere nenio legindas ol la kruela silento. Por malfari eblan miskomprenon mi ripetas mian proponon de ĉ. unu jaro :

gvidatan lertigan kurson por kuraĝigi homojn fariĝi komunikiĝemaj.
Montras karencon de bonedukiteco nei respondon al homoj kiuj bonanime proponas ion edifan, same kiel ricevi saluton kaj tute ne reciproki.
Nia GEA prezidanto iam jesis pri la iniciato do mi ripetas mian modestan helpon tiucele. Ĝi povus okazi unu fojon monate, en la GEA-sidejo, de 10h, en sabato kiam okazas Verda Kafo, ĝis tagmeze. Sufiĉas programi siajn aferojn, kombini por la sabato kaj informi min.

ESTORIOJ – D.Koimbra-ZH.

I – Magra Virino.

Apud nia tablo pasintan vesperon sidis magra virino, en drinkejo, magra kiel pasero, entute magra estis ŝi. vizaĝo kava, la nazo, beko, la kolo, vera lignero. Homaj kubutoj ja estas laŭnature magraj sed, la ŝiaj...lancopintoj. Nur ostojn kaj angulojn ŝi havis...ostoj kaj anguloj.

Eĉ side, videblis ke estis virino alta, 1m80, eble pli. Ne direblis ke ŝi malbelas. Estas... stranga. Ŝi sidis sola, glaso kun io antaŭ ŝi, la senfinaj gamboj estis plektitaj kvazaŭ liano. Ŝi igardadis la malplenon. Ĉiuj rimarkis ŝian ĉeeston, neniu tion menciis. Ĝis ŝi alrigardis nin. Turnis sian girafokolon lante flanken, niadirekten, penetris nin per rigardo duonseriozan kaj malican. Ŝajnis diri:...”mi scias aferojn...” Poste ŝi kuŝigis bankbileton sur la tablon. Stariĝis laŭ ŝia longeco kvazaŭ senfolia arbo kaj forglitis kvazaŭ fantoma figuro. Mi rigardadis dum ŝi malaperis, kaj nur poste mi komentis :- Kia stranga...
Kelkajn bierglasojn poste, sekvan frumatenon, la magra virino vidigis sin en sonĝo, rigardante min per sia malica magrega rigardo.

Estis sonĝoj ne agrablaj. Mi vekiĝis impresita. Mi diskumis al miaj amikoj kaj, antaŭ ol mi al ili referis pri la preemsonĝo, ili rakontis:ankaŭ ili sonĝis kun la magra virino.

II – Mortiga Oranĝo.

Certan epokon mia avo loĝis en Oldhamburgo. Tiutempe bona amiko lia eksuferis doloron kiu korodis liajn internaĵojn, ĝi igis lin krilamenti seninterrompe dum tagoj... Kuracistoj esploris sed neniel trovis la kialon de la malbonfarto. Liaj gepatroj fariĝis malesperaj kaj li mem multe pli, kredis baldaŭ morti. Ĝis mateno kiam fremdulo frapis la pordon de lia domo.Pritentis panjo. La viro portis nigran valizon subbrake. Li sin diris scia ke tie iu suferas.Mi scias liberigi lin el la malsano, garantiis li.

La patrino estis suspektema sed, ekstremkaze, akceptis la fremdulon sen plie pridemandi. Kondukis lin ĝis la lito de la malsanulo.La viro esploris akurate dum li faris demandojn, premante kolon,ventron, pulson, la piedojn. Post kelkaj minutoj malfermis la valizon kaj elprenis pocion oleecan en flakono. – Enprenu kaj vi resaniĝos – li diris – sed, atentu – substrekis ĉi « atentu » - ripetis per voĉo grava. Vi neniam plu povas manĝi oranĝojn. Neniam plu ! Se vi manĝos oranĝon, vi mortos! La junulo aŭdis tion, glutis la pocion kaj, fakte ekresaniĝis ĝis plensaneco kaj forgesis la suferojn, tio ja kutimas okazi kiam oni komplete resaniĝas. Li obeis la viron kaj ekskludis oranĝojn el sia dieto. Transvivis sian fraŭlecon sen manĝi oranĝojn, patriĝis, maturiĝis kaj neniam manĝis oranĝojn. Ĉiam li memoris pri la averto dirita laŭ la basvoĉo kvazaŭ de “Reporter Esso”...se manĝos oranĝon...vi mortos!
Iun dimanĉan posttagmezon li estis hejme, ankoraŭ en Oldhamburgo kaj ludis kun la filoj. Tra lia strato pasis vendisto...de oranĝoj. Estis oranĝoj lindaj, perfekte rondaj, orumitaj kiel oro de Salomono, freŝaj kiel aŭtunaj matenoj. Ĉiuj filoj, la edzino, najbaroj, ĉiuj postkuris la vendiston, aĉetis oranĝojn kaj ĝuis ĝiajn dolĉajn erojn, malsekigante sin per la bongusta suko.

Li rigardis tiun citratan* festenon kaj pensis: “Kial ne?” Do li manĝis la oranĝon. Kaj mortis.
« * Festa cítrica » kiel vi tradukus ??

<<>>

Kion signifas ĉi du estorioj? Nenion. – Diradis Belchior, “sciatas ke nenio estas dia, nenio estas mirinda, nenio estas sankta, nenio estas mistera. La sorto helpas al kiu bonon faras, la malfeliĉaĵoj malhelpas tiun kiu misfaras”. INTER estas ĉampiono de la Libertadores venkinte plurajn ludojn pro pluraj ludoj kun sortoj lastminutaj. GRÊMIO eksuferis krizon perdinte plurajn ludojn pro malfeliĉaĵoj suferinte golojn en lastaj minutoj. La trafo-maltrafo ekzistas, koincidoj okazas, akcidentoj ankaŭ. Sed ne ĉiam. Ne la tutan tempon. Alvenas momento en kiu kompetenteco superas la supernaturan. Aŭ la forton. Estas tikla momento por la forto de aplaŭdoj far Grêmio, por sufoki la malbonŝancon.

TORTURADO

Laŭ la federacia dekreto 24645, la Ŝtato respondecas pri protektado de animaloj. Punojn kontraŭ malobeo prizorgas la artikolo 32 de la Leĝo de Ĉirkaŭmedio 9605/98. Kiu mistraktas aŭ vundas sovaĝan- aŭ kortbestojn, povas ricevi kondamnon al karcero punon plus punpagon plus punpagon varian de R$500 R$2000 je animalo. Esperantistoj kompreneble helpu kontraŭstari senkorajn homojn. Ni evitu mortigon eĉ de serpento.Ne-venenaj utilas al la medio kie ili vivas kaj, venenajn oni klopodu meti en skatolon, por ĝin liveri al Butantan, kie oni utiligas la venenajn serpentojn, por fari kontraŭvenenan medicamenton.

EKZEMPLODONA ORGANIZAĴO

Certe imitindas ĉiuj bonfaroj. Tiajn faras katolikaj, programe. Tiajn faras fakoj katolikaj tra programeroj, evangelianoj, spiritistoj kiam rilatas al helpoj pro plagoj aŭ akcidentoj. Tamen, laŭ mia observo de longaj jaroj, elstariĝas tiuj de Geova’-atestantoj.Mi ne konas alian organizaĵon kies membroj urĝe kaj fervore dediĉas sin al siaj proksimuloj. Malgraŭ ke ili estas iom primokataj pro ilia insistemo, pro troigoj, ekz. nepre ne akcepti sango-transdonon en kazoj de plej ekstrema neceso. Mi kutimas legi iliajn broŝuretojn senpage disdonatajn kaj admiras iliajn diligentan laboron. Se la homaro kondutus laŭ ili, malmulto mankus ke ĉi mondo fariĝu Edeno.

Bonhumuro.

KRAŜA’= Surbrusta identigilo. Kontrolisto kontraŭ drogoj prezentiĝas al olda farmisto en Teksas(Usono) kaj anoncas: mi devas inspekti vian bienon rilate kontraŭleĝa plantejo. La farmisto iom surpriziĝas sed konsentas. OK, sed ne iru en tiun angulon de la paŝtejo. La inspektisto maldegniĝas ĉar li interpretas la averton kiel limigon al sia laboro. Li, por malfari dubojn, montras sian identigilon al la bienisto kaj diras : « ĉi kraŝa’ rajtigas min iri kien ajn mi volas en iu ajn bieno. Ĉu mi klare komprenigis min? » Kelkajn minutojn poste la farmisto vidas la federacian inspektoron urĝe kurantan, por savi sian vivon, persekutata de la plej kolera taŭro de la bieno. Lante la virbovo malgrandigas la distancon inter ili. La inspektoro terure timigita skandale krias pri helpo. La bienisto delasis sian laborilojn, kuras ĝis la barilo kaj, per la tuta forto alkrias la fuĝanton : « via kraŝa’... montru vian kraŝa’ ! »

Se la anekdoto plaĉis al vi, estu bonkora, ensendu kelkajn al la Gisto-redaktejo, nacilingve mem, P,G,H,B, por ŝtopi restantan spacon.